

POLA ESPERANTISTO

dumonata

Organo de polaj esperantistaj societoj.

Galicio, Aŭstrio.

Februaro 1907.

1. Jaro.



Treŝo:

H. Sienkiewicz: List otwarty.
Lozo: Dr. Emil Javal.
Erikajabe: Baŝn wschodnia.
Dr. Krukowski: Z pamiĉnika lekarza pułkowego.
Dr. Róbin: Esperanto na Dalekim Wschodzie.
Asnyk: Gdybym był młodszy (L. Belmont).
Tetmajer: Limba (L. Belmont).
Fredro: Paweł i Gaweł (L. Belmont).
A. Mickiewicz: Cisza morska (S. Czarnowski).
S. Czarnowski: „Logoj“.
W. Skalski: Uczmy się języka!
St. Schels: Esperanto a Idiom neutral. Ruch esperantystyczny. Rozmaitości. — Kronika.

Enhavo:

H. Sienkiewicz: Malfermita letero.
Lozo: D-ro Emile Javal.
Erikajabe: Orienta fabelo.
D-ro Róbin: El la taglibro de milita kuracisto en jaro 1905.
D-ro Róbin: Esperanto en Malproksima Oriento.
Asnyk: Se mi pli juna estus (L. Belmont).
Tetmajer: Pino: (L. Belmont).
Fredro: Paulo kaj Gaŭlo (L. Belmont).
A. Mickiewicz: Mara silento (S. Czarnowski).
S. Czarnowski: „Logoj“.
W. Skalski: Ni mem devas ellernadi la lingvon!
St. Schels: „Esperanto“ kaj „Idiom neutral“, — Esperantista Movado. — Diversaĵoj. — Kroniko.



Eldonata de Societo „Esperanto“ en Leopolo (Lwów).

— — — — — Redaktata de Komitato. — — — — —

Ĉefredaktoro de la literatura parto: Dro K. Bein (Kabe).

Roczná przedpłata:

W Austrii K 1:80
 Za granicą (Fr. 2:50). K 2:40

Pojedyncze numera:

W Austrii K 0:30
 Za granicą K 0:40

Jara abonprezo:

En Aŭstrujo K 1:80
 En Eksterlando (Fr. 2:50) K 2:40

Unu numero:

En Aŭstrujo K 0:30
 En Eksterlando K 0:40

Bibliografio.

(Libroj alsenditaj al redakcio de „Pola Esperantisto“).

Tra Mez Afriko. Parolado kun projekcioj, farita de komandanto Ch. Lemaire ĉe la dua Universala Kongreso de Esperanto en Genevo. Granda formato. Teksto franca kaj esperanta kun pli ol 60 fototipiaj ilustraĵoj. Prezo 2 fr. 50 ctj.

Tiu ĉi eksterordinare-belega verko povas prave esti nomata »modelo de l' estontaj eldonajj«. Laŭ opinio de la aŭtoro, de hodiaŭ la verkistoj devas eldonadi siajn librojn en du lingvoj t. e. unuflanke en sia gepatra, aliaflanke en dua lingvo, la sama por ĉiuj. Komprenoble la samnaciaĵoj de l' verkistoj legos prefere la nacian tekston — dum la internacia ebligas al alilingvanoj ekkoni verkon, kiu pro diversaj kaŭzoj eble neniam estus trudukita en ĉiuj lingvoj. Tiu programo, obeata en tiu unua verketo, estas nova pruvo de eraro, ĉu vola aŭ nevola, de tiuj, kiuj kulpigas Esperanton »detruisto de l' lingvoj«, dum ĝi do estas la plej bona protektanto por ĉiu natura idiomo, permesante ne malŝpari tempon por ellernado de diversaj lingvoj sed koncentrigi la tutan atenton je sia gepatra, kiun oni tiamaniere ellernos profunde, kaj de lingvo dua, la sama por ĉiuj: glora Esperanto.

Ni ne povas sufiĉe forte rekomendi tiun ĉi verkon, al kiu antaŭparolon skribis S-ro Ĝeneralo Sebert, membro de l' franca Instituto kaj prezidanto de nia lingva Komitato.

La preparolita temo, jam per si mem tre interesa, estas donita en plej modela esperanta stilo kaj la belegaj ilustraĵoj inde ĝin ornamas. Sur ĉiu paĝo ni renkontas vidaĵojn el la »Nigra Kontinento«, grupojn de enlandanoj, scenojn el la vivo en tiu ĉi ankoraŭ ne sufiĉe konata lando, kiun l' aŭtoro dufoje transiris kiel scienculo kaj civilizatoro, ne uzante perforton, respektante la rajtojn de la enlandanoj.

Blinda Rozo. Rakonto de la flandra verkisto H. Conscience, tradukis t S-ino E. van Malckebeke — van Hove. 1 fr.

Inter la verkoj de fama flandra prozisto verŝajne nenia pli meritas tradukita riĉigian libron ol tiu ĉi.

Vera juvelo de flandra literaturo, ĝi estas rimarkinda pro rava priskribo de plej delikataj kaj kortuŝaj sentoj, pro konservo de ĉarmo de juneco, de freŝeco, de sincera kortuŝeco kaj la viva pentrado de ĉiaj homaj doloroj kaj ĝojoj, de ĉiaj pasioj kaj kormovoj. La enhavo estas tiel natura kaj tiel perfekte enpenetras en la reala ĉiutaga

vivado kun ĝiaj senhaltaj ridoj kaj larmoj, laboroj kaj plezuroj, ke nin ne povas miri la sukceso de tiu verko ĉe la flandra popolo.

Al la bedaŭrinde jam mortinta tradukantino ni ne povas esti sufiĉe dankemaj pro ŝia laboro, kiu denove estas pruvo, kiom nia lingvo povas esprimi ĉiujn, eĉ la plej delikatajn nuancojn de originalo.

La eldonisto ankaŭ ĉion faris, por ke la eksteraj de libro estu eleganta kaj tamen ni malofte nur povas renkonti verkon tiel malkaran, konsiderinte ke ĝi enhavas desegnaĵojn, firitajn laŭ originalaĵoj de la flandra pentristo Edvard Dujardin.

Kelkaj floroj esperantaj. Serio unua Nr. 3. de A. J. Witteryck (eldonisto de ambaŭ suprenomitaj verkoj) enhavas, kiel la du unuaj numeroj de tiu serio, diversajn sercaĵojn, spritaĵojn kaj ilustraĵojn.

Ruĝa rido de Leonid Andrejev kaj **Ili estas frenezaj** de O. Mirbeau. Tradukis P. Avilov kaj L. Segretinat. 1 fr. 50 ctj.

Du rakontoj de la ruse-japana milito, unu de franca, alia de rusa literaturisto, ambaŭ tre konataj. Ambaŭ klopodis kaj ankaŭ sukcesis en siaj tradukoj konservi la karakteron de la originalaj verkoj kaj resti tamen internacie kompreneblaj, kio estas la unua tasko de esperanta tradukanto.

S-ro G. Moch skribis antaŭparolon al tiu libreto.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto von Dr. Zamenhof. Dua pligrandigita eldono. K 2:40. (bindigita K 3.—.)

La Germanoj povas esti fieraj pro tiu ĉi vortaro, kiu estas la plej bona el ĉiuj ĝisnunaj. Kompare kun la antaŭa eldono ĝi enhavas ne nur grandan kvanton de novaj vortoj, sed ankaŭ klarigojn, aldonitajn al tiuj esprimoj, kiuj en germana lingvo havas diversajn signifojn, ekz: Schloss — kastelo kaj seruro (pole ankaŭ »zamek«). En la unua eldono tiaj klarigoj mankis, kaj sekve nesperta esperantisto ofte ŝanceliĝis en la elekto inter la diversaj tradukoj de germana vorto, ne sciante la precizan sencon de tiu ĉi aŭ tiu esperanta radiko.

Wörterbuch Esperanto Deutsch von Jürgen. (Revidita de Dro Zamenhof). Dua pligrandigita eldono.

Pri tiu ĉi iomete pli malfrue aperinta vortaro, ni povas nur ripeti tion, kion ni jam diris supre pri la germane-esperanta parto. Ankaŭ la prezoj estas la samaj.

POLA ESPERANTISTO

Esperantaj sciigoj por pollingvanoj.

Februaro 1907.

Ĉiujn sendaĵojn (abonojn, manuskriptojn, anoncojn k. a.) oni bonvolu adresi:

„Societo Esperanto“ en Leopoldo (Lwów), Galicio, Aŭstrujo.

1. Jaro No. 4.

Alsenditaj manuskriptoj estos laŭbezzone korektataj.

Kvankam ni el nia programo elstrekis ĉiujn politikajn kaj religiajn demandojn, malgraŭ tio oni devas tamen memori, ke nia lingvo ekzistas ne nur por la societaj interrilatoj kaj komercaj utiloj.

Esperanto deziras frate ĉirkaŭpreni ĉiujn popolojn de l'tuta mondo; la humaneco estas ĝia simbolo kaj ĉio, kio koncernas tiun ĉi ideon ne povas por ĝi esti indiferenta.

Konsiderante ĉi tion ni konigas al nia legantaro la malfermitan leteron de la genia aŭtoro de „Trilogio“ — kiu estas respondo je memvoleco kaj superforto faritaj al la polaj infanoj sub fremda regno. — Tiun ĉi leteron karakterizas sincereco kaj simpleco inda de granda batalanto, kiu per la vortoj de letero alparolas nin en la nomo de idealoj, defendante la naturan rajton de ekzistado de ĉiu popolo.

Tiu letero estas klara per si mem, tial ni donas ĝin sen komentarioj.

Eri.

Jakkolwiek z programu naszego wykluczyliśmy wszelkie kwestje polityczne i wyznaniowe, toć przecie pamiętać się godzi, że język nasz nie same tylko stosunki towarzyskie, czy też korzyści handlowe ma na względzie.

Esperanto pragnie wszystkie narody całego świata w bratnim utylić uścisku — ludzkość jest jego hasłem — i wszystko, co z tem pojęciem ma związek, nie może mu być obojętnem.

W tej też myśli dzielimy się z naszymi czytelnikami listem otwartym genialnego autora „Trylogii“, stanowiącym odpowiedź na samowolę i gwałty, dokonywane na dziatwie polskiej pod obcym zaborem. Cechuje go szczerłość i prostota, godna wielkiego szermierza, który z kart listu przemawia do nas w imię idealów ludzkości, w obronie naturalnego prawa bytu każdego narodu.

List ów tłumaczy się sam przez się, podajemy go też bez komentarzy.

Eri.

MALFERMITA LETERO

de R. Sienkiewicz

al Lia Imp. Moŝto Vilhelmo IIa prusa reĝo.

Via Imperiestra Moŝto! En la momento, kiam la okuloj de la tuta civilizita mondo turnas sin kun dolora miro al unu parto de vasta regno de Via Imp. Moŝto, en la momento, kiam la gazetaro de ĉiuj popoloj, ne esceptante la honestan germanan, konstatas kaj kondamnas la maljustaĵojn faritajn al polaj infanoj en la prusa reĝlando — rajtigita estas la voĉo de ĉiu homo kaj kristano kaj des pli la voĉo de Polo, kiu turnas sin al Vi en la nomo de justeco.

La justeco estas ja pli alta kaj pli perfekta ol ĉiuj ŝtataj motivoj kaj politikaj racioj, kiuj, se ili ĝin tuŝos, ili per tio ĉi estas eraraj kaj kondukas al malĝustaj vojoj.

La malbono kaj maljustaĵo vokas je plibonigo, sed la plibonigo estas ja en la manoj de l' monarĥo. La sorto, metinte per

siaj neesplorablej juĝoj, sub la potencon de Via Imp. Moŝto unu tutan parton de la granda pola popolo, surmetis samtempe sur Vin la devon esti la polan animon, gardi feliĉon de tiu ĉi popolo, lian kredon, lingvon, tradiciojn kaj sentojn.

Dume la polaj teroj, aligitaj al la prusa regno, fariĝis ejo de malbonfarto, kiu sub Via regado bedaŭrinde ankoraŭ kreskis kaj potenciĝis. La plendoj de l' popolo je ĉi tiu malfeliĉo dissonas ne nur sen eho, sed la registraro de Via Imp. Moŝto respondas ilin per leĝoj, kiuj ŝajnas eĉ al najbaraj popoloj agoj de malamikeco kaj kvazaŭ vengo. La kvieta pola loĝantaro pagas egale kun germana la imposton de sango kaj havo sed ne prenadis batalilojn, vane do la malamikeco penas pravigi siajn farojn de perforto kaj

venĝo per malvero, ke la pola popolo celadas renversi la prusan regnon. Neinde estas por potencaj registaroj konvinki sin mem kaj la aliajn pri tio, kion ili mem ne kredas. La elementa movado, la kontraŭstaro de perfortita homa naturo ne estas politika agitacio. Tie, kie la afero concernas defendon de homaj kaj diaj rajtoj, la gardon de rilato de homo al Dio, la gardon de homa plendo, peto kaj preĝo, tie la konscienco estas la plej bona agitanto. Via Imp. Moŝto! En Via regno la prusa oficisto staris ĝis nun inter la pola popolo kaj la tera reĝo por allasii neniajn plendojn antaŭ la tronon — nun li intencas tiel same apartigi per si la popolon de dia trono.

Via Imp. Moŝto! La mezuro de persekuto de korpaj kaj animoj estas troplena. Senanima kaj nehumana estas tia leĝo, kiu, ne rimarkante ĉi-tion, ke eĉ ĉiu besto devas havi sian loĝejon, malpermesas al la Polo havi sur sia propra peco da tero tegmenton super la kapo. Teruraj, profunde nemoralaj kaj per nenia ŝtata racio senkulpigeblaj estas aĝoj, al kiuj la ploro de miloj da sendefendaj infanoj estas la respondo. La lernejo kaj en ĝi la instruisto en la prusa reĝolando ne estas gvidanto, kiu instruas la polan infanon kaj kondukas ĝin al Dio, sed ia senkompata ĝardenisto, kies oficiala devo estas perforte ŝanĝi la sanan polan kreskaĵon en kurban kaj kripligitan germanan arbajon.

Do ĉiujare pli multaj estas tiuj larmoj, pli multaj vergaj fajfoj, pli multaj turmentoj — la mezuro plenigita antaŭ Dio kaj homoj naskas, kune kun dia kaj homa kolero — malgloron. La antaŭuloj de Via Imp. Moŝto batalis multajn militojn, feliĉajn kaj nefeliĉajn, antaŭ la historio pravajn aŭ nepravajn sed grandajn kaj malfacilajn. En la hodiaŭaj tempoj prezentas sin kiel la plej granda nur tiu ĉi batalo: de tuta regno, de tuta prusa potenco — kontraŭ infanoj. La batalilo en ĝi estas unuflanke la katenoj kaj vergoj, aliaflanke — larmoj.

Vere — ju pli granda estus la venko de regno — des pli granda la malgloro ĉe ĉiuj popoloj. Sed ĝuste tial Via Imp. Moŝto ne volas kaj ne povas permesi, porke tia batalo fariĝu la ĉefa enhavo de Via regado, kunigu kun ĝi en la historio por ĉiam kaj donu nomon al Via regado.

La vortoj de reĝa manifesto de la 1867-

jaro garantias al la polaj regatoj en la prusa reĝolando, ke „per la enkorpiĝo al la nordgermana ligo nek ilia religio nek ilia lingvo malprofitos kaj ke interne de ligo ili povos resti Poloj kaj konservi la lingvon kaj la morojn“. Kiel do tiuj ĉi reĝaj vortoj kaj promesoj estas plenumitaj? Via Imp. Moŝto estas la gardisto de honoro de Germanujo, de honoro de dinastio, la reprezentanto de la imperiestra ideo? Bonvolu do konsideri, ke, se la respekto de plej malriĉa el Viaj regatoj dependas de lia kredo al vorto kaj ĵuro, kun kia kruela maldolĉa sento kaj malespero, legas la suprajn promesojn ne nur la Poloj sed ankaŭ la germanaj monarĥistoj. Ĉu ili povas defendi sin de pensoj, ke tiu ĉi ideo ne estas, kia ĝi devas esti, apogita sur la senŝancela etika bazo, ke ĉe ĝia manko ĝi mem ne kontraŭstaros al ondoj, kiujn ĉirkaŭe amasigas la nuna jarcento.

La mezuro estas plenigita. La nejustaj leĝoj ne indas sian nomon. Esceptaj leĝoj rompantaj la senton de justeco, jen ponardego ambaŭflanke akirigita. Estontaj socialaj ŝanĝoj povos ĝin turni ankaŭ kontraŭ la reĝna brusto. Malproksime estas de mi enmiksi min en la aferojn kaj estontajn sortojn de prusa reĝolando, mi ekparolas nur la historian certon, ke la registaro, kiu permesas al si ĉion, instruas la regatojn, ke ankaŭ kontraŭ ĝi oni povas permesi al si ĉion. Ne ekzistas rajto kontraŭ rajto, kaj la rajton de ekzisto donis al popoloj Dio.

Ĝi estas dia favoro, do la monarĥio, kiu sian ankaŭ el dia favoro ĉerpas, ne devas ĝin movi, ĉar per tiu-ĉi sama mano ĝi disŝiras kaj subfosas la propran. Sed en tiu ĉi afero Via Imp. Moŝto mem estos plej bona juĝisto, dume rigardu en la okulojn de tiu ĉi terura vero, kiu sekvas el rilato de regno al Poloj kaj kvankam premata, ekflamos kiel fajro el sub la tero.

— Jen milionoj de popolo, kiun gardi la sorto al Vi ordonis, sentas sin sub Via regado kaj sub la registaroj de Viaj ministroj pli malfeliĉaj ol iam antaŭe. — Jen estas perfortita la homa rajto al la tero, perfortita estas la rajto de hejmo. Jen la larmoj de infanoj superfluas la perfortitan rilaton de animoj al Dio. Diktu do Via kristana konscienco de reĝo al Via volo ĝiajn estontajn farojn.

H. Sienkiewicz.

Esp.: *Erikajabe.*

Dro Émile Javal

La morto forrabis al ni novan oferon. Dro Javal mortis en Parizo la 21. de januaro. Kiom perdis nia afero kun la morto de tiu ĉi homo, scias bone ĉiu vera esperantisto. Sendube la estonta historio de Esperanto enskribos lian nomon per oraj literoj. Dro Javal estis fama pariza okulkuracisto. Sian nomon la mortinto glorigis ne nur per siaj medicinaj laboroj, sed ankaŭ kiel scienculo kaj sociisto. Kiel kuracisto li eltrovis sian faman oftalmometron, kiel scienculo li estis elektita deputato en la francan parlamenton.

Tutan sian vivon la mortinto laboris tiel, kiel povas nur labori homo kreita por granda celo en la vivo. La kruela sorto antaŭ sep jaroj ekfrapis lin per granda malfeliĉo. Dro Javal perdis tute sian vidon. Multaj el ni sendube post tiu ĉi ekfrapo de la sorto perdus sian energion kaj farigus tute sentaŭgaj por la vivo. Dro Javal tamen apartenis al tiuj homoj, kiuj mortas morale nur tiam, kiam ili mortas entute. La malfeliĉa blindulo rapide paciĝis kun sia sorto kaj decidis daŭrigi sian ĉiutagan laboron. Li eĉ ne forlasis la akceptadon de malsanuloj, kompreneble kun la helpo de sia asistanto. Sed tuj li konvinkigis, ke la laboro en tiu ĉi direkto estos tute ne ebla, kaj li decidis tute ŝanĝi sian vivon, kvazaŭ li naskigus blinda.

Al tiu tempo apartenas lia aligo al Esperantistaro. Estas tre interese, kiamaniere Dro Javal farigis nia samideano.

Dro Javal en siaj pli junaj jaroj, kiam li ne estis ankoraŭ blinda, interesigis multe, kiel homo progresa, pri la demando de lingvo internacia. Kaj nun li ekmemoris, ke li iam legis malgrandan broŝureton pri Esperanto. Li komisias al sia sekretario alporti denove tiun ĉi broŝureton. Sed kia estis lia ekmiro, kiam lia sekretario, reveninte el librejo, sciigis al li, ke Esperanto havas jam grandan bibliotekon. Dro Javal mirigita venigis grandan nombron da libroj pri kaj en Esperanto kaj komencis fervore kun la helpo de sia sekretario lerni nian lingvon. Post iom da tempo li farigis la plej fervora nia samideano.

Fariginte Esperantisto, Dro Javal estis tamen tute alia, ol multaj el ni. Li komprenis bone, ke la platona amo al ia ideo ne sufiĉas, kaj li komencis agi en tute alia direkto. Multaj el vi sendube aŭdis pri eksistado en Parizo de „Centra Oficejo“. Tiu ĉi institucio, kiu koncentrigas ĉiujn laborojn pri kaj en Esperanto postulis grandajn elspezojn por sukcesa plenumo de sia ĉefa celo. Dro Javal oferis malavare por ĉi tio grandan sumon de 80.000 fr. kaj tion li faris tute kaŝe, ne volande ke oni parolu pri li. Se la mortinto

Bonfamo kaj oreloj.

Orienta fabelo.

Sidiĝis Kadi sur la tapiŝo kaj karesis sian longan blankan barbon, kiam la oficeja gardisto, ĝibita de laĝo, komencis elvoki la aferojn.

Alvokita, enpaŝis en la ĉambregon maljuna Turko, apoganta sin sur akompananta lin knabino. Grizeco kovris per argento liajn tempiojn, la vestaĵo atestis malriĉecon, la vizaĝo malĝojon kaj suferojn.

Ne pli bone aspektis la knabino, pala tremanta kaj mizera.

Apude, ruze ridetante, staris la kulpigito. Li moke rigardadis la mizerulojn kvazaŭ li volis satigi sin per iliaj suferoj.

La maljunulo turnis al la juĝisto larmplenajn okulojn.

— Jen — diris li, montrante la knabi-

non — mia filino aŭ pli ĝuste malĝoja ombro, kiu ankoraŭ restis el ŝi:

Bonvolu ekrigardi, justa Kadi, ĉu en velkinta ŝia vizaĝo iu povas ekkoni la plej belan knabinon, al kiu antaŭ nelonge ankorati ŝajnis ridi ora estonteco. La tuta urbo serĉis ŝiajn favorojn sed ŝi preferis super ĉiuj la junan Ibrahimon. Apenaŭ kelke da semajnoj apartigis ŝin de l' atendita edziĝotago, kiam la malfeliĉo starigis sur ŝia vojo Hasanon. Jen tiu ĉi mizeregulo — diris li, montrante la kulpigiton — tiu ĉi abomena procentegulo ekdeziris nian infanon... Vidante, ke la knabino lasas sin logi nek per vorto nek per donacoj, li komencis ĵetadi sur ŝin abomenajn kalumniojn.

Li rabis lian bonfamon...

Senhonoraj famoj rondiris tra la urbo kaj ripetitaj el buŝo al buŝo, forpuŝis de ni ĉiujn amikojn kaj konatulojn, tiel ke line Ibrahim mem ekkredis la kalumniojn kaj forlasis la knabinon.

farus nur ĉi tion por Esperanto li havus rajton esti enskribita per oraj literoj en la historio de Esperanto, sed li faris ankoraŭ pli. Dank' al siaj konatuloj en la plej alta sfero Pariza, li komencis jam sukcese la agadon por enkonduki Esperanton en francajn lernejojn. Multaj el francaj deputatoj promesis al li agi pri ĉi tio en la franca parlamento, kaj kiel ni scias, la afero iris rapide antaŭen. Dro Javal ne sukcesis tamen ekvidi la rezulton de siaj klopodoj li mortis en la momento, kiam li estis por ni la plej necesa!

Unu el heredaĵoj, kiuj restis post la

mortinto estas lia tre interesa libro „Inter blinduloj“. La malfeliĉa senvidulo donas en ĝi tre interesajn konsilojn al ĉiuj blinduloj, kiel oni devas agi perdinte la vidon. Kiu volas konatiĝi kun la granda spirito de nia mortinta samideano, legu tiun ĉi interesan libron!

Dro Javal, kiel rakontas liaj ĉirkaŭantoj ĝis la lasta momento parolis kaj pensis pri Esperanto: li eĉ mortis kun Esperanto sur la lipoj!

Dormu tranvile kara samideano!

Inter veraj Esperantistoj neniam mortos Via granda nomo. *Lozo.*

El la taglibro de milita kuracisto en jaro 1905.

Ĝis tiam dua horo post noktomezo. Mi leviĝis de la tablo por kartludo kaj proksimiĝis al la fenestro. Estis varma, senluna julia nokto. La ĉielo, kovrita de densaj nubegoj, minacis per pluvo, tamen en aero regis nepriskribebla kvieteco, kiu strange kontrastis la bruon kaj haŭson, regantajn en la klubo. Mi min apogis sur fenestro kaj miaj pensoj forportis min tuj malproksimen, tra teroj kaj maroj... hejmen. Mi forĝesis ĉion: kaj la societon, kiu min atendis apud kartotablo, kaj la hodiaŭan ordonon de l' regimentestro, mi vidis mian domon forlasitan, mi ludis kun miaj du infanoj, mi ĝojis kaj senfina paco ĉirkaŭprenis mian animon. Subite mi ekremis. Mi sentis la manon metitan sur mia

sultro kaj ekaŭdis la voĉon de l' kapitano N.

- Pri kio vi revas, doktoro? Oni atendas vin apud kartotablo; iru, iru, la feliĉo ja hodiaŭ vin favoras „carpe diem“, morgaŭ ĝi ne revenos

Mi sentis, ke la feliĉo min jam forlasis. Revoj malaperis, restis reala efektiveco kun ĝia sensencaĵo kaj mi ne volis plu kartludi. Kvazaŭ mi unuafoje estis en tiu-ĉi societo, mi rigardadis ĉiujn kaj observadis ĉeestantojn. Ĉiuj oficiroj, kunveninte en la tendaro, atendis kun malpacienca klarigon de problemo, por kio oni devigis ilin tien-ĉi veni. La matena ordono de regimentestro sonis klare kaj mallonge: — „ĉiuj oficiroj kaj kuracistoj

De ĉi tiu momento mizeriĝas la malfeliĉa infano, ploras tutajn tagojn kaj noktojn kaj atendas jam nenion ekster la morto.

Ĝis tiam la maljunulo — kaj Hasan' komencis kun tuta senhonteco malkonfesi la kulpon. Konvinkita per konfesoj de atestantoj, li estis divigita konfesi la kulpon volante gajni la juĝiston almenaŭ per malvera pentado kaj per ŝajnigita volo de plibonigo.

Mi eraris — li vokis — malfeliĉe mi mem ne sciis, kion mi pro malĝojo kaj ĵaluzo babilis pri ŝi, sed hodiaŭ mi konfesas, ke ĉio tio ĉi estis malvero, abomena malvero, ĵetita sur tiun ĉi senkulpan virgulinon.

Tiun ĉi konfesion mi faras por redoni al knabino bonfamon, kiun mi forprenis de ŝi.

La juĝisto donis signon kaj laŭ turkaj legoj li kondamnis la kalumnianton je detranĉo de l' oreloj.

Pleregante ĵetis sin Hasan' sur la ge-

nuojn kaj petegis kompaton, sed malgraŭ lia kontraŭstaro eliris lin la servistoj el la ĉambrego, kaj la krio alfluginta el la korto montris, ke la ekzekuto senprokraste estis plenumita. — Sangante, senigita de oreloj, enkuris Hasan' en la ĉambregon kaj vokis:

— Justecon mi postulas, nenion pli, nur justecon. Jen oni detranĉis al mi la orelojn — do se mi faris eraron, mi ja rebonigis kulpon. Mi ja konfesis mensogon, mi reprenis la kalumniantajn vortojn kaj redonis al knabino honestan nomon kaj bonfamon.

Efektive vi redonis, — ekkriis la juĝisto — tial via plendo ŝajnas al mi prava kaj rajtigita. Sed trankviliĝu, vere al vi fariĝos justeco. — Poste, turnante sin al la servantaro, li diris: „redonu al li liajn orelojn“.

Erikajabe.

kunvenu hodiaŭ vespere, sepan horon, en la tendaro kaj ne disiru sen permeso de l'estro. La rotoj estu pretaj". — Estas videble, ke kelkaj oficiroj sciis la klarigon de tiu eksterordinara ordono, sed ili konservadis silenton.

En la unua ĉambro de l' klubo, kie staris la bilardo kaj la tabloj por kartoludo, regis plej granda bruo. La trapado de bilardaj kugloj miksigis kun ekkrioj de oficiroj jam estintaj sub influo de alkoholo kaj kun ekkrioj de ĝojo aŭ malbeno de kartludantoj. La fumo de cigaredoj plenigis la ĉambron kaj malfaciligis la spiradon. La ĉefa temo de paroladoj estis kompreneble la hodiaŭa ordono:

— Por kiu diablo oni tenas min la tutan nokton en tendaro — bruis la bonanima sed ĉiam kriema kapitano M. — kiam mi volas dormi. Jam trian nokton mi maldormas.

— En servo, kompreneble — interrompis lin la pikema leŭtenanto A.

— Tio estas indiferenta, mi volas dormi kaj mi tuj iras hejmen; jam estas la tria horo.

— Bonan vojon, kapitano, mi donos al vi lanternon — ŝercis A.

— La sepon en mezan truon — eksnis la voĉo de l' oficiro E. — ne koleru kapitano, mi vetas oran moneron, ke mi gajnos la partion, ĉu vi akceptas?

La kapitano malplenigis glaseton da vino kaj turnis sin al leŭtenanto P., kiu estis mirinde malafabla, kaj kvankam pasia kartludanto, en tiu-ĉi punkto eĉ ne proksimiĝis al tablo.

— Kio vin turmentas, P., ĉu la amatino vin forlasis? Ne malĝoju, fraŭlinoj ne mankas en la mondo. Eble vin maltrankviligas la sorto de la kondamnitaj soldatoj, kiujn vi tiel belege defendis? Mi estas certa, ke la regnestro ilin pardonos.

Leŭtenanto P. nenion respondis. Li trapasadis la ĉambron kun manoj en la poŝoj kaj lia sulkiginta frunto kaj nervaj ekstremadoj de la pala vizaĝo atestis, ke lin turmentis ia penso grava, malĝoja, eĉ unu momenton lin ne forlasanta. La leŭtenanto interesis min ĉiam. Lia eksterajo, kiu rememorigis Napoleonon Unuan, estis objekto de revoj de ĉiuj fraŭlinoj, sed P. evitadis societon kaj oni klarigis lian strangan indiferentecon al urbaj belulinoj, ke li jam estas verŝajne fianĉo. Mi lin ofte renkontadis en la klubo kaj liaj interparoladoj atestis, ke li estas tre inteligenta kaj liberala homo, sed min ĉiam mirigis lia pasio al kartludo, tiel ne konforma al liaj seriozaj opinioj pri la vivo. Hodiaŭ li eĉ ne proksimiĝis al la kartotabloj.

Subite enkuris la deĵoranta soldato kaj raportis:

— La regimentestro iras!

Fariĝis tumulto inter la kartludantoj. Oni rapide kaŝis kartojn kaj fermis la tablojn.

— Diablo lin prenu, — malbenis laŭte ĉiam malgajnanta leŭtenanto N., — en la momento, kiam la sorto fine ekridetis al mi, li venas kaj oni devas ĉesigi la ludon!

En la ĉambron eniris la regimentestro. Ĉiuj levigis.

— Vi min pardonu, sinjoroj, ke mi venas tiel malfrue, sed min haltigis hejme la ofico, sidiĝu; sinjoro adjutanto mi vin petas en la kancelarion. Ĝis baldaŭ revido, sinjoroj.

— Mi proponas malgrandan partion — ekkriis N. post lia eliro, li ne baldaŭ revenos.

— Ne, ne, — protestis multaj, — li povas reveni ĉiun momenton.

— Fine mi ekscios la kaŭzon de nia kunveno, — oscedis M. — kaj revenos feliĉe hejmen.

Post nelonga tempo aperis la regimentestro kun sia adjutanto.

— Sinjoroj, hodiaŭ matene efektiviĝos la ekzekuto de kvar kondamnitaj soldatoj!

En la ĉambro subite ekregis morta silento. Leŭtenanto P. paliĝis kaj apogis sin sur la tablon.

— Via moŝto — murmuris li, — mi sendis petskribon al la regnestro pri pardono..

— Mi tion scias, sed respondo ne venis kaj mi ne havas rajton prokrasti la ekzekuton. La unuaj kvar rotoj — la estro sin turnis al ĉiuj — kun oficiroj ekiru tuj en la placon de l' ekzekuto kaj vi doktoro iru kiel eksperto. Donu signalon al elpaŝo. Aliajn rotojn tenu, sinjoroj, pretaj en la tendoj. Neniu devas dormi. Oficiroj restu en la klubo.

Fariĝis granda movado. Destinaj al ofico eliris tuj al siaj rotoj.

— Kaj dormi mi plu ne volas, malbenita vivo! — opiniis M. kaj malplenigis ankoraŭ unu glaseton.

— Eble ni daŭrigos la ludon? — proponis malkuraĝe N. sed ĉiuj indignis.

— Hontu N., en tia momento!

Mi eliris el la ĉambro. En mia animo bataladis du kontraŭaj sentoj: la timo de tio, kio estis okazonta kaj la peka scivolo, sed ĉeesti mi kompreneble laŭ ordono devis.

La placo de ekzekuto estis post la tendaro tri verstojn. Mi decidis piediri. Estis varma nokto. Mi iris tiel malrapide, ke kiam mi proksimiĝis al la placo, la suno jam montriĝis en la horizonto. Oni povis esperi belegan, varman tagon. Eĉ plej malgranda venteto ne interrompis la regantan silenton, nur la blekado de ĉevaloj de kvardek dragonoj,

ordonitaj plenumi la kondamnon, de tempo al tempo eksonis en aero kaj devigis min ĉiafoje ekstremitaj. Sur la placo estis elfosita granda kavo kaj antaŭ ĝi estis enmetitaj en la teron kvar altaj palisoj — apogo por la malfeliĉuloj en la lasta momento de ilia vivo.

La historio de l' kondamnitaj estis en malmultaj vortoj jena: pro diversaj kulpoj en la ofico ili estis senditaj en la punrotojn, kie regas plej severa disciplino. Unu tagon la rotoj ekribelis kaj kelkaj soldatoj, inter kiuj estis la kondamnitaj, atakis sian estron kaj vundis lin per bajonetoj. La juĝo kondamnis ilin al morto.

En malproksimo aperis granda, nigra kaleŝo, ĉirkaŭita de cent kozakoj kaj proksimiĝis al ni tre malrapide. Ĝi neniam alvenu!

Sed ne, kvankam malrapide tamen la interspaco fariĝis pli kaj pli malgranda, kaj jen... la kaleŝo estas apud ni, ĝi haltas.

Unu kozako desaltas kaj malfermas la pordeton. El la kaleŝo eliras kvar junaj homoj, tiel junaj, ke la morto mem verŝajne kompatos kaj forpuŝos ilin.

Unu ploras, kore ploras.

— Via moŝto, — li turnas sin al la regimentestro, — pardonu min, mi ne volas morti, mi estas senkulpa, pardonu!

La estro deturnas kapon: li estas kortuŝita.

— Mi ne povas vin pardoni, — li respondas, — mi ne havas rajton.

— Ĉesu plori! — rimarkas severe la plej maljuna, alta maldika maristo, — kion fari, oni devas morti... kaj post mallonga paŭzo li ekkrias: se li almenaŭ ne vivus! — Lia voĉo videble tremas, kiam li rememorigas la malamatan estron.

La oficiro donas signon. La dragonoj proksimiĝas kaj formas unu linion dekkvin paŝojn antaŭ la palisoj.

— Via moŝto, — petas unu el kondamnitaj — permesu al mi ekfumi cigaredon.

Mi komprenas: li volas prokrasti la finon, li volas vivi unu minuton pli longe. Malbenita vivo, vere malbenita.

Li eltiras tabakon el la poŝo, sed liaj manoj tremas tiel, ke li ne povas ekbruligi la alumeton. Li do forĵetas la cigaredon. Kaj kio restas nun? La morto? Lin kaptas la kolero: deŝirante la ĉapon li ĵetas ĝin en la kavon kaj ekkrias: for, ses jarojn vi servis al mi...

Subite la kolero ĉesas kaj li daŭrigas kun mola voĉo: atendu min tie, mi baldaŭ sekvos vin.

Unu soldato alportas kvar blankajn kite-lojn kaj transdonas ilin al la kondamnitaj. La plej juna ree komencas plori, sed rimarkinte la severan rigardon de l' maristo, rapide surmetas la kitelon kaj apogas sin al la paliso.

— Nun fratoj — ekkriis la estro — repaciĝu kun Dio kaj kun homoj; patro — li turnis sin al la pastro — donu al ili la krucon.

Ĉiuj ĉeestantoj ekster la maristo demetis la ĉapojn, kaj la pastro, dirinte mallongan preĝon, etendis al ĉiu el kondamnitaj krucon por kisado. Post tio ili ĵetis sin sur la teron kaj kisante ĝin komencis saluti al ĉiuj kvar flankoj.

— Pardonu nin, sinjoroj oficiroj, pardonu nin bonaj homoj kaj vi fratoj soldatoj pardonu... Nun ni estas pretaj, via moŝto...

— Ĉu alligi vin al la palisoj? — demandis la estro.

— Ne, via moŝto, — respondis ili unuvoĉe, ni mem staros.

Oni alportis tuketojn por ligi la okulojn. Unu, kiu ĝis nun la tutan tempon silentis, etendis la manon por preni la tuketon. La maristo haltigis lin.

— Tomaso, vi timas morti kun malfermitaj okuloj?

Tomaso silente retiris la manon. Ĉiuj kvar apogis sin al la palisoj. La dragona oficiro levis la glavon...

— Fratoj — petis Tomaso — celu en la bruston!...

La soldatoj levis la ĉanojn. Fariĝis subite morta silento...

Fratoj, homoj, kion vi faras? Rigardu viajn oferojn, ĉu tian vizaĝon havas krimuloj? Ili vin ne timas, ili rigardas vin trankvile; la maristo eĉ mokas vin, malestine ridetas, kvazaŭ rememorigante al vi siajn vortojn en la juĝo: mi venĝis kaj mi volonte mortas por vi. Kial vi juĝistoj paliĝis? Kial tremas viaj manoj? Ĉu ne sufiĉas al vi la sango de miloj da martiroj, kiuj jam mortis por vi. Sed ne, vi bezonas novajn oferojn. Pafu do, malbenitaj, pafu!

La dragona oficiro mallevas la glavon.

Eksonis mallonga, seka pafado, la aero ekstremita, kaj kvar junuloj falegis sur la teron, kvazaŭ tranĉitaj per granda falĉilo.

El la buŝoj kaj nazoj de mortintaj elfluis nigra sango, la korpoj tremadis ankoraŭ konvulsie kelkajn minutojn kaj malrapide malvarmiĝis...

Mi proksimiĝis kaj palpis la pulson.
Ĉio estis finita.

— Ili mortis — mi raportis — ordonu sinjoro regimentestro, ke oni enterigu la kadavrojn.

La soldatoj trenis la malvivulojn en la kavon.

La forĵetita ĉapo renkontis ree sian kapon.

Dro. Krukowski.

Esperanto en Malproksima Oriento.

(Raporto originale verkita por la Varsovia Societo Esperantista kaj legita en la kunveno 11-an Decembron 1906 de Dro Wilhelm Róbin.)

Estimataj Gesinjoroj!

Kiam mi forveturis en Malproksiman Orienton en Februaro de 1904 jaro, t. e. antaŭ apenaŭ 3 jaroj, la stato de nia afero en Varsovio estis malbona. La tieaj samideanoj estis disaj, nenion pri si reciproke sciis, ne konis unu la alian, ne estis organizitaj. Ni ĉiuj laboradis por Esperanto en la silento de niaj kabinetoj kaj revadis pri la tempo kiam estos ebla grupiĝi, kuniĝi kaj kune pripensadi la rimedojn de disvastigado de nia kara lingvo.

Veturante en Orienton, nome en urbon Habarovsk mi sciis, ke en tiu ĉi urbo ekzistas grupo esperanta, filio de Petersburga societo „Espero“, ĉar sur la kovrilo de la „Lingvo internacia“ mi ofte legis, ke tiu ĉi gazeto estas inter aliaj ankaŭ la organo de grupo esperantista Habarovska. Mi devas konfesi, ke jam sola sciigo, ke en tiu ĉi terura kaj malproksimega urbo loĝas esperantistoj aldonis al mi kurageon kaj ke post tio mi ekhavis tute alian opinion pri la kulturo de l' Oriento, ol antaŭe. Ĉar se en ia urbo troviĝas homoj, kiuj sentas la bezonon fondi societon sur la idea bazo, sur la bazo de scienca disvolvigo kaj lernado de la lingvo internacia, — tio ĉi montras sendube, ke la spirita nivelo de l'urbo, sekve verŝajne ankaŭ de tuta Oriento, estas sufiĉe alta.

Mi alveturis Habarovskon kun intenco trovi iun el membroj de la grupo esperantista. Sed mi devas tie ĉi priskribi, kiamaniere mi konatiĝis kun unua esperantisto Habarovska. Kelkaj tagoj post mia alveturo, kiam mi sidis en mia loĝejo, subite eniras oficiro kaj demandas esperante pri mi. Agrable mirigita mi prezentis min kaj eksciis, ke antaŭ kelkaj horoj S-ro Tenisov aŭdis okaze de nia komuna konatolino pri la alveturo de Varsovia esperantisto kaj rapidis min viziti. Mi turnas Vian atenton, estimataj Gesinjoroj, je

la rapideco, kun kiu S-ro Tenisov afable min trovis kaj gratulis en fremda lando. De la unua momento kaj dum tuta mia restado en Habarovsk regis la sama koreco en la rilatoj ne nur kun S-ro Tenisov, sed ankaŭ kun ĉiuj aliaj esperantistoj.

La grupo Habarovska konsistis tiam el kelkaj dekoj da membroj. Sed pro la milito multaj societanoj forveturis kaj tial povis okazadi nek la kunvenoj de la komitato nek la publikaj lecionoj. Prezidanto de la grupo estis S-ro Polanski (forestanta), sekretario S-ro Ŝtirlin. La plej fervoraj kaj sindonemaj samideanoj estis, krom la suprenomita prezidanto kaj sekretario, ankoraŭ S-roj Plusnin kaj Tenisov.

Ni renovigis la ĉiusemajnajn kunvenojn en la malvasta rondeto de ĉirkaŭ dekkvin personoj. Ni kolektiĝadis unu fojon en semajno en la privata loĝejo de S-ro Ŝtirlin. Tiuj ĉi kunvenoj restigis tre agrablajn rememorojn. Post la pretigo de l'aferoj formalaj, ekzemple respondoj de leteroj ricevataj de la komitato kaj t. p., la plej ofte sekvadis diskutado pri praktikaj rimedoj de propagandado kaj disvastigado de nia lingvo inter multaj personoj, kiuj alveturis en nian urbon el diversaj flankoj de la rusa regno.

Poste disvolviĝadis diskuto pri la „Rondiranto“, kiun mi devas tie ĉi preparoli pli precize. Dek personoj, kiuj jam bone posedis nian lingvon, konsentis enskribadi unu post alia en saman kajeron siajn verkojn, ĉu originalajn, ĉu tradukojn. Ĉiu sekvanta havis krom tio la devon tralegi la laboron de sia antaŭulo kaj sur la margeno fari rimarkojn koncerne la vortoj aŭ esprimoj, kiuj laŭ lia opinio estis nebone uzitaj. Ĉiuj korektoj devis esti skribe motivitaj. Tiu ĉi kajero estis nomata „Rondiranto“. La kajero estis alportata ĉiam en la kunvenon kaj la korektoj servadis kiel vasta materialo por diskutado.

En la kunvenoj oni paroladis lingvon rusan, escepte unu duono da horo, dum kiu oni devis paroladi esperante.

La grupo subtenadis rilatojn kun aliaj societoj kaj grupoj, de kiuj ĝi ricevadis ofte poŝtkartojn kun fotoĝrafioj de la membroj, ekz. el Voroneĵ, el Japanujo k. t. p. En la plej proksimaj rilatoj la grupo estis kun esperantistoj Vladivostokaj, ĉar tiuj ĉi du urboj kuŝas proksime unu de alia. La grupo Vladivostoka, ankaŭ filio de la Petersburga societo „Ĝespero“, estis antaŭ la milito pli multnombra ol la grupo Habarovska kaj montris multe da energio en la afero de disvolvigado de nia ideo. Ekzemple dank' al penoj de tiu ĉi grupo estis aranĝitaj koncertoj en kiuj oni kantadis kaj deklamadis esperante. Tiujn ĉi koncertojn oni aranĝadis por la profito de la grupo esperanta kaj vorton „Ĝesperanto“ oni skribadis sur la oliŝo per grandaj literoj. Krom la enspezoj tiuj ĉi koncertoj altiradis al nia ideo multajn novajn adeptojn.

Librojn kaj gazetojn oni povis aĉeti kaj aboni en kelkaj lokoj (ĉe sekretario de la grupo, en la urba librejo kaj en la magazeno de S-ro Plusnin). Legi ĉiujn gazetojn oni povis senpage en la publika biblioteko, kie sur unu de tabloj estis dismetitaj 16 diverslandaj gazetoj esperantistaj. Tio ĉi estis merito de S-ro Polanski, kiu estis unutempe prezidanto de la grupo esperantista kaj estro de la Publika Biblioteko Habarovska.

El supreskribita Vi vidas, estimataj Ĝesinoroj, ke nia afero estas en Malproksima Oriento en manoj de lertaj kaj spertaj homoj, kiuj sin dediĉas al nia ideo kun tuta fervoro. Tial do nia lingvo estas en Malproksima Oriento multe pli konata kaj faris tie ĉi multe pli grandan progreson, ol ekzemple en Centrala Rusujo aŭ ĉe ni. Mi proponas, ke nia Societo per la manoj de nia estimata Komitato trasendu al la grupoj Habarovska kaj Vladivostoka niajn dezirojn de fruktoporta agado en estonteco.

Se mi pli juna estus!..

de Asnyk.

Se mi pli juna estus, fraŭlino,
Ho, se mi estus pli juna,
Mia trinkaĵo estus ne vino,
Sed el rigardoj Viaj la suna
Nektaro dolĉa, fraŭlino!

Vi min tiame ekamus eble,
Angelo klara...
La kor' ekstremis nun nehalteble;
Feliĉ' ja estus troe senbara,
Se Vi min ekamus eble...

Ne serĉus mi tiam sur nokta ĉielo
Je sun' aŭ stelaro...
Mi Vin rigardadus nur, bela angelo;
Ĉar Vi ja pli multe eklumos, ol klara
De stela ĉielo...

Mi malestimus sunan klarecon
Kaj dolĉan printempan spiron...
Mi trinkus sole Vian belecon,
En Vi havante mian inspiron
Kaj sunklarecon...

Sed ve! mi estas troe maljuna,
Ve! mi ne povas jam peti,
Ke min varmigu la amo suna...
Mi sole povas kanton kanteti,
Ĝestante troe maljuna...

De Vi forkuras mi kun sufero,
Ho, Vi, papilio ora!
Ĉar ne permesas al mi fiero
Ke mi montriĝu sopira, plora...
Forkuras mi kun sufero...

Mi ride trinkas.. Mi trinkas vinon
Kun miaj larmoj miksitaj
Kaj mi rigardas, bela knabino,
Vian estonton nube kovritan
Kaj trinkas vinon...

Tradukis: *Leo Belmont.*

Pino

de Tetmajer.

La sola pino bruas
Sur kruta la ŝtoneg'...
Ĉe la piedoj ĝiaj
Nigriĝas profundeg'.

Ĉirkaŭas ĝin malvarma,
Malgaja mur' granita...
Kaj supre nigrajn nubojn
Kurigas vent' subita...

Per la dezerto ŝtona
De ĉie ĉirkaŭita,
La sola pino bruas
Senfine ĉagrenita.

Tradukis: *Leo Belmont.*

Paŭlo kaj Gaŭlo.

de Aleksander Fredro.

Vivis Paŭlo kaj Gaŭlo en dom' tiu sama:
 Paŭlo — supre kaj Gaŭlo malsupre loĝadis...
 Paŭl' neniun ofendis trankvila pacama;
 Plej sovaĝajn petolojn do Gaŭl' elpensadis.
 En la ĉambro li ĉasis: jen hund', jen leporo;
 Inter tabloj, tabletoj, li pelas kaj sonas
 Kaj trumpetas kaj pafas; en ĉasa laboro,
 Kriegante, saltante, laciĝon ne konas....
 Paŭlo ĉion toleras, sed fine ne povas
 Iras suben al Gaŭlo, petegi lin provas:
 „Kompatiĝu, sinjoro, kaj ĉasu pli mole,
 Ĉar ĉe mi ĉiuj vitroj ekfalos senvole!“
 Kaj Gaŭlo je ĉi tio: „Libera hometo
 En sia dometo.“

Kion je ĝi respondi?!... Paŭl' ĉapelon prenis,
 Eĉ vorton li ne pepis kaj hejmen revenis.
 Morgaŭ Gaŭlo ankoraŭ bonguste ronkadas,
 Jen nazon lian io de plafon' gutadas...
 Li eksaltis el lito kaj supren rapidas.
 Frap! frap! — fermite!... Kio? — Per tru' li
 [ekvidas
 Strangajon: tuta ĉambro estas akvoloko,
 Kaj Paŭlo sur komodo sidas kun fiŝhoko.
 „Sinjor', Vi kion faras?!“ — „Mi kaptas fi-
 [ŝetojn!“
 — „Sed, sinjor', mi sur kapo sentas la gute-
 [tojn!“
 Kaj je tio ĉi Paŭlo: „Libera hometo
 En sia dometo!“

El fabel' mor' instruon Vi legos facile:
 „Vi — tiel al alia, li al Vi simile!“

Tradukis: *Leo Belmont.*

Mara silento.

A. Mickiewicz.

Vento iom rubandon de flago tremigas;
 La klara ludas akvo mallalte ondante,
 Kiel la amatino feliĉon revante ;,
 Vekiĝis, ekĝemetis — dorm' ree ŝin ligas.

Veloj, kvazaŭ standardoj post batalo vera,
 Dormas sur nudaj mastoj; ŝip' kiel sireno
 Balancetiĝas, kvazaŭ forĝita per ĉeno;
 Marist' ripozis, rido aŭdiĝas sincera.

Maro! vivas en via malvarma la koro
 Polipo dum ventego sur fundo dormanta
 Sed kiu dum silento sufokas per brak'!

O penso! vivas hidro en via memoro,
 Kiu dum malfeliĉo restas silentanta,
 Sed distranĉas la koron en trankvila tag'!

Tradukis: *S. Czarnowski.*

Ĥogoj.

(Bagatelajo originale verkita.)

Mi amos vin
 Knabin'
 Ĉiela,
 Anĝela!
 Ke nia viv' forfluos
 Kaj ni en ĝi nur ĝuos
 La amon
 La flamon
 En koro.
 Doloro
 Neniam nin ĉagrenos;
 La oro
 Rivere al ni venos;
 Miraklaj sentoj
 Kunforgos nin,
 Favoraj ventoj
 Blovos sen fin'
 Serene!
 Senpene
 Viv' fluos nia...
 Ho! estu mia,
 Knabino!

* * *
 Fino...

S. Czarnowski.

Ni mem devas ellernandi la lingvon!

En „The British Esperantist“ ni legas
 tre bonan artikoleon titolitan: „Ni ellernadu
 la lingvon“. L' aŭtoro R. I. Mc Laren skri-
 bas jenon:

Multaj esperantistoj proponas diversajn
 rimedojn por propogando de Esperanto; unuj

diras, ke estus tre sukcesplene instruadi jam
 junajn infanojn; aliaj, ke estus bone varbi
 la komercistaron; aliaj, ke oni devus sin
 turni al la registaroj, porke ili enkonduku
 Esperanton en lernejojn k. t. p. Ĉiuj estaj
 pravaj. Sed — laŭ la opinio de l' aŭtoro —

antaŭ ĉio le esperantistoj mem devas ellernadi bone la lingvon. Se ni, esperantistoj, ne bone ĝin scias, ni malhelpas iom al l'afero. Ĉar kiel ni povas klarigi bone al nia varboto l'aferon, se ni mem pri ĝi ne multe scias? Ni diras, ke la esperanta gramatiko estas tre facila kaj ke ĝi konsistas nur el kelkaj reguloj! sed, se oni nin demandas pri tiuj reguloj, ni estos senelokventaj.

Jen alvenas fremdulo kaj volas sin komprenigi per helpo de Esperanto ĉar li ne scias nian lingvon. Li renkontas okaze sur la strato iun kun verda steleto en la butontruo kaj alproksimiĝas al li. Bedaŭrinde tamen tiu verdstelulo krom la steleto havas nenion komunan kun Esperanto.

Eble la estro de iu Esperantisto ricevos iam esperantan leteron el alilando: „Ho!“ diros li „Jen estas letero, kiun mi ĵus ricevis, Ĝi estas skribita en lingvo, kiun mi ne komprenas. Ĉu ĝi estas Esperanto? Vi multe babiladas pri tiu lingvo, traduku la leteron al mi“. Ne ricevu ĉi tiu estro respondon: „Mi ne ellernis ankoraŭ Esperanton“.

Tiuj ĉi ekzemploj montras tre bone, ke per tia maniero ni ne konvinkas skeptikemajn kaj mokemajn ne-esperantistojn. Antaŭ ĉio ni mem devas ellernadi Esperanton kaj poste ĝin propagandadi. Alie ni nur malhelpas kaj eĉ malutilas al esperantismo!

Witold Skalski.

„Esperanto“ kaj „Idiom neutral“.

En mia antaŭa artikolo (Noj 1—2), komparante Esperanton kun Volapiko, mi montris la mankojn de tiu ĉi lasta lingvo kaj la kaŭzojn de ĝia malsukceso. Kvankam estus interese paŝo post paŝo sammaniere pritrakti ĉiujn posteajn provojn de artaj internaciaj lingvoj, mi tion ĉi ne povas fari pro manko de loko, ĉar dum la jaroj 1880—1905 aperis kelkaj dekoj da ili; al flanko ilia reciproka simileco liberigas min de tiu-ĉi laboro. En la nomita periodo, ĉiu ajn, kiu havis sufiĉe da mono, tempo kaj fiereco fariĝi aŭtoro de nova »lingvo« penadis ekprovi siajn spiritfortojn, verkante projektojn de artefaritaj idiomoj. Sed jenaj viroj (virinoj estis pli modestaj) ne volis konfesi, ke ne sufiĉas elpensi iajn finiĝojn¹, gramatikajn regulojn kaj kvanton de vortoj por esti jam verkisto de nova lingvo. Tial inter novaj projektoj oni povas trovi tre multajn, kiuj diferencigas reciproke nur per tio, ke finiĝo, signifanta en unu substantivon aŭ nominativon, servas en alia por adjektivo aŭ akuzativo. Tiuj ĉi ŝanĝoj estis la ĉefaj pli (?) bonigoj enkondukitaj de l'aŭtoroj. Ĉiu, agante tiel, povus ja ekpensi centojn da idiomoj — sed ĉu la ideo aŭ praktiko de lingvo internacia havus el tio ian profiton? Certe ne, ĉar unu sola eĉ ne tute perfekta internacia lingvo estas multe pli bono ol kelkaj plej perfektaj, kiuj nur pligrandigus la »babelan turon«. Neniu ja lernus internacian lingvon, se ekzistus samtempe kelkaj kaj se oni ne povos esti certa, kiu el ili fine venkos. Feliĉe la sukceso de Esperanto estas tiel certigita, ke por ni la projektoj de aliaj aŭtoroj havas nur pure teorie-historian signifon.

Unu el jenaj lingvoj estas »Idiom neutral«, kiun mi ĉi-tie preparolos, ĉar ĝi tion pleje indas pro la historio de ĝia deveno pro ĝia ŝajna facila komprenebleco kaj ankaŭ tial, ke ĝi estas la plej bona el aliaj tie ĉi ne preparolotaj.

Dezirante plibonigi kaj plibeligi la lingvon Volapik', kreis la dua volapika kongreso lingvan akademion, kunmetitan el 24 membroj, kiuj estis rajtigataj fari ĉiujn plibonigojn kaj ŝanĝojn, enkonduki novajn vortojn, elĵeti malnecesajn, anstataŭi neoportunajn regulojn per pli bonaj, unuvorte fari ĉion, kio povus savi volapikon. Tiu ĉi »Akademio« komencis sian agadon en jaro 1888; en la laboro partoprenis iom post iom ĉirkaŭ 100 homoj, ŝanĝante kaj plibonigante tiel volapikon, ke post multjara laborado rezultis tute nova lingvo, kies vortaro kun gramatiko aperis germane kaj angle en la jaro 1902, kaj kiu estas tiel ne simila al volapiko, kiel ekzemple la franca lingvo al germana; eĉ la nomo »volapük« ne restis kaj ne povis resti, ĉar oni krom aliaj ŝanĝoj elĵetis ankaŭ la literon »ü«.

Sed ankaŭ hodiaŭ ne estas finita la laboro de ĉiuj akademio (»Akademio internacia de lingu universal«). Ĝi kontraŭe ĉiam penas plibonigadi la vortaron kaj tial senĉese aperas novaj projektoj, ŝanĝoj de centoj da vortoj kaj de gramatikaj reguloj. Neniu do, kiu jam ellernis tiun ĉi lingvon, povas esti certa, ĉu morgaŭ aŭ post jaro ne estos farita nova ŝanĝo, kiu devigos lin forgesi milojn da esprimoj kaj anstataŭ ilin lerni novajn, kiuj ja ankaŭ povos esti baldaŭ ŝanĝitaj.

Kiam oni scias, la volapika vortaro kon-

sistas precipe el laŭvole elpensitaj aŭ el tro kripligitaj anglaj vortoj; nur malofte oni trovas tie internacian radikon. Tiun ĉi mankon de volapiko ekvidis la akademio kaj penis anstataŭi la volapikaĵojn per pli bonaj t. e. internaciaj vortoj. Fine ĝi verkis pli malpli »esperantan« vortaron. Ni do trovas en *Idiom neutral* (legu: ne-utral, ne neŭtral) vortojn: *apetit*, *diametr* kaj similajn, kiuj estas egelaj en lingvoj angla, franca, germana, hispana, itala, latina, rusa k. a. kaj kiujn oni jam antaŭe povis trovi en Esperanto. La direktoro de l' akademio konfesas ja ankaŭ mem, ke oni prenis la vortojn el la suprenomitataj lingvoj kaj ke oni ĉiam serĉis en esperanta vortaro, ĉu nia Majstro ne uzis pli bonan esprimon.

Legante ĉi tion, oni povus pensi, ke *Idiom neutral* estos idealo de lingvo internacia, ĉar verkita de multaj »akademianoj«, kiuj havis antaŭ la okuloj tre bonan modelon, nome »Esperanto« kaj multajn aliajn plimalpli bonajn projektojn de artaj lingvoj, ĝi povus eviti tial la malbonaĵojn de tiuj ĉi lingvoj kaj fariĝi senmanka, bonega, bela, riĉa kaj facila, unuvorte perfekta lingvo.

Por konstati, ĉu la laboro de la »Akademio international« estis sukcesplena, ni devas antaŭe ekkoni la gramatikon kaj la vortaron de *Idiom neutral*.

La alfabeto konsistas el 22 literoj, t. e.: a, b, c, d, e, f, g, h, i, j, k, l, m, n, o, p, r, s, t, u, v, y. Apudestarantaj vokalojn oni devas ĉiam aparte elparoladi ekz: *no-i* (ni), *a-utomat* (automato). La konsonantoj sonas kiel en Esperanto krom jenaj: c kiel ĉ, j kiel ĵ, y kiel ĵ kaj la konsonantkunligo sh kiel ŝ.

La reguloj pri akcentado estas: Oni devas akcenti tiun vokalon, kiu staras antaŭ la lasta konsonanto, ekz: *arbór* (arbo), *sénsu* (sento); se vorto ne enhavas tian vokalon, tiam akcentata estas la unua, ekz: *mái* (majo). Sed tiuj ĉi reguloj ne estas sen escepto kaj tiam oni signifas la akcentotan vokalon per streketo, ekz: *musé* (muzeo).

La substantivoj deklinaciigas laŭ modelo kord, de kord, a kord, kord, — kordi, de kordi, a kordi, kordi (koro).

La akuzativo estas egala kun nominativo kaj devas ĉiam stari post la verbo. Ankaŭ la dativo povas esti sen prepozicio »a«, ekz: *il donav mi libr* (li donis al mi libron). Aldonante »a« oni el vira faras virinan substantivon, ekz: *galino* (koko), *galinu* (kokino). Ankaŭ tiu ĉi regulo ne estas sen esceptoj, ekz; *patr* (patro), *matr* (patrino). Al esperanta

sulikso »id« respondas prefikso *yun-*, ekz: *yun kaval* (ĉevalido.)

La adjektivoj estas neŝanĝataj kaj finiĝas per *abl*, *al*, *ad*, *atr*, *id*, *ik*, *os* kaj multaj aliaj diversaj sonoj. Nia »ol« estas »ka«. La adjektivoj devas ĉiam stari post la substantivoj.

Numeraloj (nombraj vortoj) ĉefaj *un*, *du*, *tri*, *kuatr*, *kuink*, *seks*, *sept*, *okt*, *nov*, *des*, *sent*, *mil*.

Nombroj ordaj havas du finiĝojn: aŭ *un im*, *du-im*, *tri im* k. c. aŭ *prim*, *sekund* k. c.

La ĉefaj numeraloj staras ĉiam antaŭ substantivo, la ordaj post ĝi.

Pronomoj: *mi* (mia), *vo* (vi), *il* (li), *no-i* (ni), *ili* (ili) k. c. sed: *mi-e* (mia), *votr* (via), *si-e* (lia), *lor* (ilia). La loko de ĉiuj pronomoj estas ĉiam antaŭ ilia substantivo.

Verboj. Infinitiva finiĝo: *av*, ekz: *vis-av* (vidi). Modelo de konjugacio: *mi vis* (mi vidas), *mi av vised* (mi vidis), *mi visero* (mi vidos). Por la kunmetitaj tempoj oni uzas du helpajn verbojn: *avar* (havi) kaj *esar* (esti), ekz: *mi avoro esed amed* (mi estos amita).

Adverboj finiĝas per »e«, sed ekzistas ankaŭ multaj egalformaj kun adjektivoj.

La prepozicioj havas diversajn finiĝojn aŭ »u«, ekz: *durantu* (dum).

Afiksoj. Kiel en Esperanto, ni ankaŭ ĉi-tie trovas diversajn afiksojn, nome 33 prefiksojn kaj 34 sufiksojn, sed tiu ĉi nombro konstante kreskas.

Fine sekvas unu frazo:

»*Idiom neutral intereseero et votr filio, kel kolekt postmarki, kaŭse ist idiom es lingu praktikal pro korespodad ko kolektatori in otr landi*«.

(Idiomo neŭtrala interesos ankaŭ vian filon kiu kolektas poŝtmarkojn, ĉar tiu idiomo estas praktika lingvo por korespondado kun kolektantoj en aliaj landoj).

Idiom neutral estas, kiel ni vidas, tre simila al Esperanto (ĝia historio klarigas kial), kaj tial mi devas, krom la supre donita parto de gramatika regularo, pli detale preparoli ĝiajn diferencojn kompare kun Esperanto kaj montri la mankojn. Ni ja estas rajtigataj kritiki tiun ĉi idiomon eĉ tre severe, ĉar ĝi estis verkita ne, kiel Esperanto de unu sola homo, kiu la tutan sistemon mem elpensis, mem devis juĝi, kiaj formoj estos pli bonaj, kiuj vortoj estas plej internaciaj, kiu viro ne havis modelojn eĉ ne la »volapikon«. Tie kontraŭe Akademio, t. e. multaj personoj, multlingvuloj, apogante sin sur

diverseĝaj modeloj kaj inter aliaj sur la jam konata kaj elpruvita Esperanto, laboras pli ol 18 jarojn kaj fine restas demando, ĉu ili vere verkis ion pli bonan, se ne perfektan,

aŭ ĉu ili perdadis tempon por atingi ridinde malgrandan rezultaton — unuvorte, ĉu ili ne eltrovis la jam eltrovitajn Amerikon. (Daŭrigota).

ESPERANTISTA MOVADO.

Afriko. Laŭ sciigo de la gazeto „Le Courier de Tananarive“, kiu konstante enhavas artikolojn pri Esperanto kaj kronikon, nia ideo dank' al fervora propagandado de kapitano Fortin havas sur la insulo Madagaskaro ĉirkaŭ 1000 anojn. La kursoj de la lingvo estas senpagaj.

Ameriko En Boston, kie estas nun kelkaj centoj da esperantistoj fondiĝis kursoj, en kiuj partoprenas 150 ĝelernantoj. La Senato decidis al la Societo pagi ĉiumonate 120 K. kaj la Publika Biblioteko abonas kelkajn esperantistajn gazetojn kaj havas dekojn da esperantaj libroj.

En Brazilujo la militistaro aranĝis du kursojn por la instruantoj kaj lernantoj de la milita lernejo en Rio de Janeiro. Laŭ sciigo, ricevita de tiea klubo „Esperanto“, en tiu urbo ekzistas jam du esperantaj konsuloj el kiu unu speciale por komercaj aferoj.

Mirinda estas la disvolviĝo de nia afero en la Unuigitaj Ŝtatoj. Ekster la jam anoncita „L' Amerika Esperantisto“ komencis elradi nova tre bele presita gazeto „The American Esperanto Journal“ eldonata de la „Amerika esperantista Asocio“. Kiel grandega estas la progreso de Esperanto en tiu ĉi lando, oni povas ekkoni el sekvantaj sciigoj, ĉerpitaj el supre nomita organo. En Philadelphio samtempe estas kvin grandaj publikaj kursoj kaj dum unu el la kunvenoj de klubo pli ol 500 anoj kantis himnon „La Espero“. Prof. Huntington de „Harvard“-Universitato esperantigis unu el siaj matematikaj verkoj. La grupo en la blindlernejo en Boston presigis jam multajn esperantajn librojn por blinduloj. La grupoj en Everett, Nev York, Ĉikago, Washington, Los Angeles, Ohio, Portland, Rockland, Montreal, Toronto, Winnipeg, Worcester, Nev Britain, San Diego, Monticello, Peoria rapide kreskas kaj la Societo en Seattle laboradas tre entuziasme, porke la Internacia esperanta Kongreso de 1909 okazu en ĝia urbo kune kun la Alaska-Yukon-Pacific-Ekspozicio.

Anglujo. Dro O' Connor, verkisto de esperantaj lernolibroj por Angloj ricevis oficialan sciigon de la privata sekretario de la reĝo

de Anglujo, ke Lia Reĝa Moŝto Eduardo VII. kompleze akceptis esperantajn librojn. Konsulejoj fondiĝis en multaj urboj kaj multevizitataj kursoj en ĉirkaŭ kvardek lokoj. La Estraro de Instruado enkondukis Esperanton en la Teknikan Lernejon. La Cambridge'anoj fervore agadas por bone pretigi la trian internacian kongreson kaj la oficiala helpo de regno kaj urbo estas certigita.

Australio. S-ro Marx, agema propagandisto, komencis novan kurson en Lidmer. Baldaŭ aperos nova ĉiumonata ĵurnalo: „The New Zeland Esperantist“ eldonata de esp. klubo en Christchurch. En Boulder ekzistas malgranda esperantista rondeto, konsistanta el tri Aŭstralioj, unu Belga, unu Polo, unu Anglo kaj unu Skoto.

Austrujo. En Brno aranĝis la tiea grupo 17. XII. belan kaj sukcesplenan kristnaskan feston. La grupo eldonis ankaŭ hektografitan folion „Serca Gazeto“. Inter tieaj blinduloj fervore propagandas Sro Pavelka. En Arnsdorf paroladis Sro Richter laŭ peto de tiea Pedagogia Societo. Post lia parolado du fabriklaboristoj, unu germano kaj la alia ĉeĥo, interparoladis tre flue esperante, kovinkigante per tio ĉi ĉiujn ĉeestantojn pri la taŭgeco de Esperanto por internacia interkomunikiĝo.

Belgujo. La belega ĵurnalo „Belga Sonorilo“ aperas de nun dufoje en monato dank' al komandanto Lemaire, kiu al ĝi oferis 2000 fr. Tiu ĉi agema propagandisto faris paroladon pri Esperanto en Gento antaŭ 150 oficiroj, por kiuj poste estis malfermita kurso. La esperantista grupo en Laeken aranĝis esperantistan feston, en kiu partoprenis preskaŭ 300 samideanoj. La oficiroj de la 13 infanteria regimento fondis esperantistan klubon. En la Brusela „Cercle polijglotte“ abato Richardon, profesoro de la Instituto „Sankta Ludoviko“ traktis la demandon pri arta lingvo kaj prezentis la plej bonan solvon: Esperanton. En la universitato komencis nova kurso de nia lingvo.

Bulgarujo. Aperis 1-a numero de nova propaganda ĵurnalo „Lumo“. En Sofia estis malfermita supera kurso de nia lingvo. Multaj instruistoj en Plevno komencis lerni Esperanton.

Danujo. En Kopenhageno komencas eliradi propaganda esper. gazeto. La „Lernolibro de Esperanto“ eldonita antaŭ kelkaj monatoj de s-ro Giötling en kvanto de 3000 ekzempleroj estas jam tute disvendita.

Francujo. En Parizo fondiĝis nova societo „La Barĉo“, kies membroj kunvenas por kune vespermanĝi parolante nur esperante. La grupo en Bordeaux decidis aranĝi esperantan sektion en granda internacia marista ekspozicio, kiu ĉi-tie okazos en 1907. Preskaŭ 80 grupoj de „Franca Societo por propagando de Esperanto“ malfermis novajn kursojn. En kelkaj urboj fondiĝis novaj esperantistaj konsulejoj. La grupoj en Tours kaj Havre aranĝis belajn kaj sukcesplenajn esperantistajn festojn. La internacia kongreso de la dentkuracistoj intencas verki specialan esperantan vortaron.

Germanujo. La franklurta grupo „Progreso“ organizis tre belan „Esperanto - Vesperon“. Dro W. Ostwald parolis en Berlino antaŭ pli ol 600 geaŭskultantoj. En multaj urboj komencis novaj kursoj. En Hamburg la loka grupo de la germana unuigo de komercaj helpantoj akceptis Esperanton kiel lingvon instruotan.

Hispanujo. Esperantaj kursoj estas legatitaj en 20 urboj kaj en multaj jam estas fonditaj konsulejoj. En Guardia fondiĝis „Internacia Societo Pedagogia“ kiu eldonos propran organon.

Holando. La eldono de gazeto „Holanda Pioniro“ estos renovigita. Holandaj naciaj ĵurnaloj enpresas esperantajn tradukojn.

Hungarujo. En la botemplanaj logio Elet (Vivo) komencis s-ro Baranyi kurson.

Italujo. Nia fervorega samideanino S-ino Junck faris grandan sukcesan paroladon en la blindulejo en Milano kaj kemencis kurson. La tiea „Cirkolo Filologico“ decidis enkonduki instruadon de nia lingvo. En Siracusa S-ro Favara same post parolado aranĝis kurson. La urbeŝtaro kaj la komerca ĉambro helpas al nia movado.

Japanujo. S-ro Kavaji inspektoro de superaj lernejoj enkondukis Esperanton en knabinan lernejon en Sumoto. S-ro Gauntlett, nia fervora propagandisto instruis dum la lasta jaro 825 lernantojn kaj nun en urbo Kanazawa li gvidas novan kurson kun pli ol 60 aŭskultantoj.

En Tokio okazis ankaŭ kelkaj semajnoj kongreso de japanaj esperantistoj. Kiel prezidanton oni elektis S-ron Kuroito. En la kunveno estis legitaj du tre interesaj referatoj, unu skribita kaj alsendita de fama japana

diplomato Hajaŝi, kiu postulas la enkondukon de Esperanto en diplomacion por internaciaj aferoj — la dua verkita de vicprezidanto de japana komerca Ĉambro, s-ro Ikeda Kerio, kiu montris la praktikajn utilojn de Esperanto en internaciaj komercaj rilatoj.

Peruo. La Ĉambroj de l' Deputatoj kaj de l' Senatanoj akceptis projekton, porke la registaro donacu al tiea esperanta gazeto „Antaŭen Esperantistoj!“ ĉiumonate kvin sterlingajn funtojn interŝange por 50 ekzempleroj de la gazeto, kiujn la ministro disdonos al sciencaj societoj.

Rusujo. En Moskvo fondiĝis „Moskva Esperantista Societo“. La Pskova grupo havas nun preskaŭ 100 anojn. En Tiflis la grupo aranĝis unu kurson por 30 lernantoj kaj duan, kiun oni devis dividi en tri partojn. La Petersburga S-to „Ĝespero“ ricevas el maliberejoj multajn mendojn por alsendo de libroj kaj „Ruslanda Esperantisto“, kiujn ĝi senpage alsendis.

Svedujo. Unu el la fondistoj de nova „Sveda Esperantista Societo“ oferis por ĝi 1500 Kronojn. En Stokholm fondiĝis „Klubo esperantista de laboristoj“.

Svisujo. Prof. René de Saussure fondis en Genevo „Centran Sciencon Oficejon“ kiu de nun eldonados la monatan gazeton „Internacia Scienca Revuo“ antaŭe dum tri jarojn eldonatan en Parizo de la firmo Hachette kaj Ko.

Diversaj Esperanta german-slava kongreso en Allenstein. Sinjoroj Albert Ŝutkowski kaj Ernst Vihert sendis al Esperantista Centra Oficejo sekvantan sciigon:

„Jam de longe, rigardante la longedaŭran malamikecon de la rasoj germana kaj slava, en niaj orientaj regionoj flugpendadis la ideo pri la forigo de tiu ĉi malamikeco kaj pri alproksimigo de la du rasoj. Tial ne estas simpla okazo, se precipe en la koroj de Esperantistoj tiu ĉi rimarkinda ideo alradikiĝis, iom post iom preciziĝis kaj fine trovis ĝian esprimon en la intenco jam tiel difinita: Je Pentekosto okazos de la 19-a ĝis la 21-a de majo 1907 „Unua Esperanta German-Slava Kongreso“, kies programo mallonge estas la sekvanta:

„La 19-an: Alsalutado de la partoprenantoj kaj interkonatigo;

„La 21-an: Plenumado de la kongresaferoj;

„La 21-an: Amuzado per ekskursoj en la belegan arbaron, teatro, balo k. t. p.;

„La Kongreso okazos en Allenstein (Prusujo Orienta).

„Certe la efektiviĝo de ĉi-tiu ideo multe-
go alportus al la amikaj interrilatoj de la du
ĝis nun disigitaj rasoj kaj signifus ankaŭ
gravegan progreson por Esperanto en niaj
regionoj.

„Por ke ni povu pli elike antaŭri kaj
planplene aranĝi la Kongreson, ni devas fondi
malgrandan Centran Komitaton. En ĉi-tiu
komitato estos la ĉeforganizantoj: por Prusujo
Okcidenta, S-ro Greff, prezidanto de G. E. en
Elbing; por Prusujo Orienta, Dro med. Eb-
ner en Königsberg, kaj por Rusujo-Polujo
S-ro A. Grabowski, prezidanto de la V. S.
E. en Varsovio“.

Esperanto en reĝaj palacoj. La greka
reĝo estas fervora amanto de nia lingvo,
kiun li lerte parolas kaj propagandas en sia

familio. Laŭ sciigo, kiun ni legas en „The
Daily Cronicle“ de la 26. de novembro ankaŭ
la princo Olaf de Norvegujo lernas Esperan-
ton; same faras la princoj de la reĝa angla
familio.

Naciaj lingvoj, instruitaj per Esperanto.

Jam ofte okazis, ke oni instruis naciajn lin-
gvojn per Esperanto. Por montri al ĉiuj, ke
Esperanto ne estas malamiko de la naciaj
lingvoj, sed ke kontraŭe ĝi povas helpi al
ili ĉiuj, S-ro P. Boulet verkis francan grama-
tikon en Esperanto, al kiu S-ro Boirac ald-
onis antaŭparolon. La prezo de verko, estas
fr. 1.50. Por mendi ekzemplerojn oni skribu
al S-ro Paul Boulet, Boulogne-sur-Mer, bou-
levard du Prince Albert 80. (Francujo).

Diversaĵoj

La urbestro de Odense sendis al dana
reĝo Kristian la VII. du delegitojn, el kiuj la
unua dum aŭdienco tiel longege parolis, ke
la reĝo fariĝis enua kaj malpacienca. Ekvi-
dinte tion ĉi, diras la dua delegito, ke la lo-
gantoj de Odense ordonis al li ripeti la pa-
roladon de l'unua deligito, se lia peto ne estos
plenumita. La reĝo, aŭdante tion ĉi, tuj plen-
umis la dezirojn de l' Odenseanoj.

Al unu razisto en Sarajevo venis foje
junulo por razigi sin. La barbisto, estante
homo tre gaja, demandis junulon, kie li estis
naskita kaj ricevinte respondon, ke en Banja
luka, rediris: „Mi aŭdis, ke la Banjalukanoj
estas heroo gento kaj tieaj viroj kutime razas
sin sen antaŭa sapumado“. La junulo volis
montri, ke li estas vera Banjaluka heroo kaj
certigis, ke li ankaŭ ĉiam razas sin ne sapu-

mante barbon. La barbisto komencis razi,
sed li ne finis eĉ duonon de barbo, kiam la
junulo, ne povante pli longe elteni la doloron,
petis, por ke la razisto uzu almenaŭ akvon,
ĉar li efektive ne naskiĝis en Banjaluka mem,
sed nur en ĝia ĉirkaŭaĵo.

II.

Skribu aritmetikan esprimon, kies re-
zultato devas esti 100, uzante ĉiujn dek
ciferojn t. e. 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 0 sed
neniun kelkfoje.

(Sekvanta ekz. solvo:

$97+1-4+\frac{88}{6}+5$. 2. 0 estas erara, ĉar ĝia
rezultato estas nur 98).

La administracio de »Pola Esperanti-
sto« dislotos tri librojn kiel premio inter
tiuj niaj legantoj, kiuj alsendos plej gran-
dan nombron de bonaj solvoj de 10 unuaj
presotaj problemoj.

KRONIKO.

Leopolo. Jam en nia antaŭa numero
ni rimarkis pri la kurso komencita de S-ro
Skalski. Nun ni aldonas, ke solena finiĝo
estis la 11-an de decembro 1906 de ĉeesto
de multaj aŭskultantoj.

Pri la facileco de nia lingvo atestas
plej bone, ke post mallonga tempo (12 le-
cionoj) la lernantoj tradukis esceptojn el
»Pola Antologio« de Kabe.

Post la lasta leciono unu el la lernan-
toj, S-ro Arnold Bodek en flua kaj kura
esperanta parolado dankis al instruanto por
lia sukcesplena laboro kaj la penoj pri pro-
pagando de Esperanto.

Dank' al tiuj ĉi rezultatoj, kiuj pruvas,
ke nia lingvo estas por ĉiuj facile akirebla
kaj ne postulas, kiel la aliaj, multe da tempo
por ellernado, ni povas konstati, ke la mo-
kaj kaj antaŭjuĝoj rapide malaperas kaj ke
ĉiutage kreskas la nombro de abonantoj de
»Pola Esperantisto« kaj la nombro de sa-
mideanoj, vizitantaj nian societejon.

La estraro aranĝas ĉiusemajne marde
kaj ĵude esperantajn legadojn kaj paroladojn.
Multaj geparolantoj sukcesplene konigas niajn
anojn kun la plej nova esperanta literaturo.

Aparte citindaj estas du legadoj: unu
de nia prezidanto S-ro Reiner, kaj dua de

S-ro D-ro Fels. La unua klarigis la celon de Esperanto, ĝian fundamenton, kaj la plej bonajn rimedojn por kiel eble plej rapide kaj bone ekposedi la lingvon.

S-ro D-ro Fels legis propran artikolon »Pri la vegetarismo kiel popola nutraĵo kaj sanigilo«. Tiun ĉi interesan legadon ni kun permeso de laŭtoro represos en »Pola Esperantisto«, porke ankaŭ niaj legantoj, ne ĉeestintaj en societejo, povu ĝin ekkoni.

Ĉiusabate kunvenas rondento de esperantistoj-stenografiistoj.

Por konvinki la plej grandajn rondojn de niaj samurbanoj, ke Esperanto ne estas utopio, sed jam nun povas servi al praktikaj celoj kaj ke ĝi posedas belan kaj riĉan literaturon, decidis la Societo dum monato marto aranĝi publikan deklame - kantan vesperon, en kiu partoprenos (ekster aliaj) ankaŭ artistoj de leopola urba teatro S-roj Wysocki kaj Szobert, estantaj de longe niaj societanoj.

En la unua duono de marto komencos ankaŭ nova kurso de nia lingvo. Detaloj estos afiŝitaj.

La 16-an de februaro okazis Ĝenerala Kunveno de membroj de Societo Esperanto en Leopolo. Krom decidoj, koncernantaj administraciajn aferojn, kiel ŝanĝo de statutoj, akcepto de jara kalkula raporto kaj ŝanĝo de kolizaĵoj, tiu ĉi Kunveno unuvoĉe elektis nian Majstron D-ron L. Zamenhof kiel Honoran Prezidanton kaj S-ron inĝenieron. N. P. Evtifeieff, kiel unuan Honoran Membreon de Societo, esprimante tiamaniere laŭ disponeblaj rimedoj al Li sian dankecon por la morala kaj materiala subteno, kiun Li tiel malavare kaj konstante oferis al ni.

La estraro de Societo konsistas el S-roj: J. Reiner (prezidanto), V. Skalski (viceprezidanto), F. A. Bodek (sekretario), S-roj M. Dzikowski (kasisto), E. Antonjeviĉ (vickasisto), S. Schels (bibliotekisto), T. Urbański, V. Sedlaczek kaj V. Śniadowski.

La enskribpagoj kaj kotizaĵoj estas de nun:

- | | |
|---|----------|
| a) por leopolaj membroj, enskribpago | 1 K — h |
| jara kotizaĵo | 6 K — h |
| b) por leopolaj elevoj enskribpago | — K 50 h |
| jara kotizaĵo | 4 K — h |
| c) por ne leopolaj membroj enskribpago | — K 50 h |
| jara kotizaĵo | 3 K — h |
| d) por anoj de kunligitaj grupoj, enskribpago | — K 25 h |
| jara kotizaĵo | 2 K — h |

Geedzoj pagos duoblan enskribpagon sed nur unuoblan kotizaĵon.

La kalkulan raporton por la jaro 1906 ni presas aparte.

Tarnopolo. Kvankam tie esperantista societo naskigis sur tero tute ne prilaborita por akcepto de nia granda ideo, kvankam plimulto de tieaj urbanoj preferas aŭskulti fabelojn pri »tera lupo« ol dediĉi sian atenton al serioza penso, kvankam la societo devas batali ne nur kun dormemeco, senideco kaj aliaj moralaj malamikaĵoj de progreso, kaj ankaŭ kun materialaj malfacilaĵoj, ĝi tamen kreskas kaj progresas iom post iom antaŭen.

Antaŭ nelonge la societo finis la unuan kurson direktatan de sia prezidanto s-ro Jurkov. La lecionoj, havintaj pli vere karakteron de komuna amuzo ol de lernado, alportis al ĉeestantaro duoblan profiton: ekkonon de la lingvo kaj agrablan memoraĵon de vere inteligente pasigitaj liberaj horoj.

La 20-an de decembro 1906 faris s-ro Jurkov en tarnopola »Czytelnia naukowa« (Scienca legejo) publikan paroladon elmontrantan la eblecon kaj necescon de lingvo internacia, la disvastiĝon de Esperanto kaj ĝian sukceson en la civilizita mondo, ĝian praktikan utilecon kaj moralan signifon por la homaro.

La 19-an de januaro malfermis la societo sub direktado de s-ro Jurkov publikan kurson, kiu estas farata ĉiumarde kaj ĉiuvendre en urba popollernejo. Ankaŭ ĉe arango de ĉi tiu kurso trovis la societo multajn malhelpaĵojn, kiuj dank' al s-roj: D-ro Wang, M. Hermann, s-inoj B. Haker kaj A. Goldmann feliĉe estis venkitaj.

Buczacz. La 16-an de decembro estis farita parolado pri lingvo Esperanto de s-ro Leonardo Janiec, kiu ekinterestigis multnombro kunvenintan aŭdantaron.

Oni povas esperi, ke tiu ĉi granda ideo venkos ankaŭ provincajn opiniojn, kaj ke en tiu urbola nombro de samideanoj konstante kreskos. Tuj post la parolado enskribigis parto de konvenintoj en la leopolan patrinan societon.

Nova Sandeco. La ideo de internacia helplingvo estas tie ĉi alte ŝatata kaj inter la urbanoj oni nur malofte renkontas homon kiu malfavere parolas pri Esperanto. La tica societo aranĝas ĉiusemajne dufoje kunvenon de anoj, sed pro manko da tempo ili ne partoprenas sufiĉe multnombro. Tamen la ĝisnunaj progresoj promesas, ke tiu ĉi societo, havanta ĉirkaŭ 50 anojn, estos forta bazo por plua disvastiĝo de nia lingvo en okcidenta Galicio.

Kalkula raporto de „Societo Esperanto en Leopolo“

laŭ stato de l' 31. decembro 1906.

I. Kasa kalkulo.

ENSPEZOJ	K	h	ELSPEZOJ	K	h
Enskribpagoj kaj kotizaĵoj	983	25	Presejo	1222	80
Donacoj por propagando	135	08	Societejo	202	—
Vendo de eldonaĵoj	767	41	Aĉeto de libroj kaj gazetoj	231	15
Abonoj de „Pola Esperantisto“	116	08	Luo de kursoĉambro	109	—
Vendo de esper. signoj	169	20	Aĉeto de esper. signoj	116	75
Ĝispezoj de parolado	32	30	Elspezoj de sekretariato	257	43
Diversaj	30	86	Diversaj	27	23
			Mono en kaso	67	81
	2234	18		2234	18

II. Bilanco.

AKTIVAJ	K	h	PASIVAJ	K	h
Mono en kaso	67	81	„Pola Eldona Kapitalo“	544	56
Ŝuldo de librejo	700	—	Saldo	849	35
Ŝuldoj de esp. Societoj	291	75			
Provizo de libroj	324	91			
Provizo de esper. signoj	9	44			
	1393	91		1393	91

SUBSKRIBIS:

J. Reiner, prezidanto
V. Skalski, sekretario

M. Dzikowski, kasisto

E. Antoniewicz kaj K. Borkowski
membroj da revizia komisiono.

Kasa kalkulo de la Varsovia Societo Esperanto de la jaro 1906.

ENSPEZOJ	R	k	ELSPEZOJ	R	k
1/1 1906 Saldo	124	26	Kopilibro	1	—
Kotizaĵoj de membroj	76	—	Por la aranĝo de la Geneva kongreso (100 fr.)	38	50
Oferoj de la membroj por aranĝo de l' Geneva kongreso	12	50	Abono de gazetoj	59	75
			Ludo de salono por le kunvenoj	25	—
			Abono de „Pola Esperantisto“ por la membroj	37	50
			Poŝtaj markoj	3	—
			26/12 Saldo	48	01
	212	76		212	76

SUBSKRIBIS:

Honora Prezidanto: *Dr. L. Zamenhof*
Prezidanto: *Antoni Grabowski*
Vicprezidanto: *Leopol Blumental*

Sekretario: *K. Bein*
Kasisto: *Adam Zakrzewski*
Bibliotekisto: *A. B. Brzostowski.*

Prezo de anoncoj.

Tuta paĝo unufoje	K 16—
1/2 da " "	8—
1/4 " " "	4—
1/8 " " "	2—

Nekomercaj anoncoj de Societanoj (ekz. pri ŝango de adreso, korespondado k. s.) estos kalkulataj po — 60 h. por ĉiu 20-ono da paĝo.

Ĉe trifoja aŭ pliofta presado de sama anonco estos donata rabato 25%

Do nabycia w redakcyi „Pola Esperantisto“

Gramatyka języka Esperanto (W. Skalski) wyczerp.	— 50 K
Vortaro esperanta-pola (St. Ĥazica)	— 40 „
Słownik polsko-esp. " "	— 40 „
Pola antologio (Kabe)	2— „
Fundo de l' mizero (Sieroszewski)	0.75 „
Interrompita kanto (Orzeszko)	0.75 „
Odnaki esperanckie (gwiazdki)	1— „

Germana Esperantisto.

Monata organo de germanlingvaj grupoj, redaktata esperante kaj germane. Enhavo propaganda, kronika, literatura.

Abonprezo por ĉiuj landoj Mk. — 3. Rb. 1.50.

Admin. kaj Red. Berlino. Prinzenstrasse 95.

„Ruslanda Esperantisto“

Ĉiumonata organo Esperantorusa de la S-to „Espero“. — Vasta kaj varia materialo pri la problemoj kaj movado de Esperanto. Social-politika fakoj. Verkoj de gloraj modernaj beletristoj. Detalaj prospektoj riceveblaj senpage. La jara abonpago (kune kun membriĝo en la S-to „Espero“) — 3 rubloj (8 koronojn), Adreso: Ruslando, St. Petersburgo, B. Podjaĉeskaja, 24, en la S-to „Espero“.

„TRA LA MONDO“

Tutmonda multilustrata Esperanta revuo.

Kunlaborado plene internacia pri la sekvantaj temoj: nuntempaĵoj, arto kaj literaturo, sciencoj, komerco, industrio, militistaro kaj maristaro, teatro, sportoj, virina kaj gejunula paĝo, feliĉeto, ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj.

Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de Kompetentuloj kaj anoj de Plandoj aluditaj. Grava fakoj por ĝenerala politika informado.

Eliras je la fino de ĉiu monato.

Jarabono: 8 fr.; kvaronjare 2 fr. 25 c., per monpapero. Administracio: Mendon, (S-O), France. Oni povas sin turni al „Pola Esperantisto“.

Rekomendinda propagandilo

Arte ilustritaj vidaĵokartoj, eldonitaj de S-to esp. en Krakovio po 6 h unu riceveblaj ĉe ni, aŭ en Krakovio.

Kiu volas akiri perfektan stilon en Esperanto
Tiu devas zorge kaj atente tralegi la modelan stilan verkon

KIU ESTAS LA

Fundamenta Krestomatio

de D^{ro} ZAMENHOF

Ĝi estas aĉetebla ĉe Societo Esperanto en Leopolo.

Prezo: K 3'60.

Główny skład wydawnictw Towarzystwa „Esperanto“
we Lwowie

= H. Altenberg, Lwów. =

**Pierwsza galicyjska fabryka
bielizny i kołder**

pod firmą

**Unua galicia fabriko de
tolajo kaj litkovriloj**

sub firmo

Lwów, plac Kapitulny 3.

Wiktor Sedlaczek

Lwów, plac Kapitulny 3.

poleca

z najlepszych materyalów starannie wy-
rabianą bieliznę damską, męską, dla
dzieci i niemowląt.

**Całe wyprawy ślubne. — Wyprawkę
dla niemowląt.**

Kołdry wełniane i puchowe.

Ceny stałe a niskie. Cenniki dostarczam
gratis. Wszelkich informacyi udzielam
chętnie.

rekomendas

tolajon virinan, viran kaj infanan zor-
geme fabrikitan el plej bonaj materia-
lajoj.

Kompletaj edzigaj dothavoj.

Dothavetoj por suĉinfanoj. Lanaj kaj
lanugaj litkovriloj. Fiksaj kaj moderaj
prezoj. Prezaroj senpage kaj afrankite.

Ĉiuj informoj volonte donataj.

Oni korespondas ankaŭ esperante.